GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

NIA PONTO

Barrencalle Barrena, 7 - 1.°
Telefono 416 44 92
48005 - BILBAO

2ª jaro Decembro 1988 Numero 12 (6)

Ĉu vi legas esperante ?



• 15 DECEMBRO •

TAGO DE LA

ESPERANTA

LIBRO

****

ZAMENHOFAJ FESTOJ

(paĝo 4)

En la foto,
du etaj esperantistinoj.

pri la kongreso * * *



MEMORU KE ... post la 31-a de Decembro, la aliĝkotizoj sufiĉe pli-altiĝos. Do, ankoraŭ estas tempo por ke vi aliĝu al nia Kongreso kiel eble plej favore al via monujo, sed ĝi baldaŭ elĉerpiĝos.

RAPIDIĜU ALIĜI AL LA KONGRESO DE BILBAO !

LOĜEJOJ.- Post niaj unuaj demarŝoj antaŭlonge komencitaj kaj ankoraŭ ne finitaj, ni atingis jenajn rezultojn:

- Studenta Restadejo "Colegio Mayor Deusto", apartenanta al la fama privata Universitato de Deŭsto (10 min. piede de la Kongresejo). Nur individuaj ĉambroj. Dormi kaj matenmanĝi: 2.500 ptoj/persone. Dormi kaj tri manĝoj: 3.000 ptoj/persone.
- Ni daŭrigas niajn demarŝojn ĉe la respondeculoj de la Studenta Restadejo "Miguel de Unamuno y Jugo" (4 min. píede de la Kongresejo), apartenanta al la Oficiala Vasklanda Universitato. Ankoraŭ sen rezul.
- En la venonta numero de NIA PONTO (februaro 1989-a) ni detale informos pri aliaj eblecoj: hoteloj, pensionoj, apartamentoj, k.t.p.

ALIAJ KONGRESEJOJ.- Krom la centra Kongresejo, ni sukcesis havigi al ni plej centran konstruaĵon por okazigi en ĝi E-ekspozicion kaj

NIA PONTO

Organo de l' GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO
Barrencalle Barrena, 7 - 1º
Telefono: (94) 416 44 92

Redaktis:
Jesús M. García
Iñaki Vélez

Aperas dumonate.
Eldonkvanto: 225 ekz.

Dep. legal: BI-1007-88

hispanlingvan prelegon, ambaŭ kun la celo altiri neesperantistan publikon.

Alia kunvenejo, for de la Centra Kongresejo, estos en Vitoria (urbo je 60 km. de Bilbao), kie ni okazigos la Solenan Fermon de la Kongreso, al kiu ni invitis la Prezidanton ("Lehendakari") de la Vaska Komunumo, Sinjoro José Antonio Ardanza Garro. La vojaĝo al Vitoria estos senpaga por la kongresanoj, pro tio ke estas Programero.

★★★★★★★★★

LASTA NOVAĴO.- Post vizito al Urbodomo de Portugalete (13 kmojn. norde de Bilbao), kaj interparolo kun la urbokonsilantaro pri kulturo, li pleninterese aŭskultis niajn petojn kaj promesis apogi ilin, nome:

- Nomumi iun straton "Esperanto".
- Akcepto de la kongresanoj en la Urbodomo far de la urbestro kaj disdonado de ia memoraĵo inter la ĉeestantoj.
- Faciligi la vojaĝon de la kongresanoj en la fama pendoponto kiu staras en tiu-ĉi urbeto kaj kunligas unu al la alia flanko de la rivero Nerviono.
- Aparte de tio, la respondeculo de hotel-restoracio staranta apud la Urbodomo, la rivero kaj la pendoponto, jesis al nia demando organizi komunan nemultekostan manĝon por ĉiuj la kongresanoj.
- Kaj por fini, ni rememorigas vin ke ni planas vojaĝi ĝis Portugalete per ŝipeto tra la rivero Nerviono (aŭ per trajno, laŭ la eblecoj), dank'al ĝentileco de la Bilbao-a kaj Portugalete-a Urbodomoj.

★★★★★★★★★

EN LA VENONTA NUMERO DE "NIA PONTO" (Februaro 1.989-a), NI PUBLIKIGOS LA PROVIZORAN PROGRAMON DE LA KONGRESO KUNE KUN LA LOĜEBLECOJ.

ATENTU PRI ĜI !

********** Zamenhofaj Festoj **********

ZAMENHOFAJ FESTOTAGOJ.- Samkiel ĉiujare, okaze de la naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof (Bialjstoko,15-XII-1859/Varsovio,14-IV-1917), ni samtempe, kiam la tuta Esperantistaro, organizos diversajn kunvenojn kaj festenojn al kiuj tutkore kaj sincere, vi ĉiuj estas invititaj. Jen la programo:

Jaŭdon 15-an de Decembro:

7,30 h.: Kolokvo pri "Perspektivoj de la Esperanta Lingvo en la nuna tempo".

Sabaton 17-an de Decembro:

7 h.: Projekcio de la vidbendo "Vivi en Eŭskadi". (25 min.).

7,30 h.: Projekcio de la vidbendo "Esperanto". (40 min.).

8,15 h.: Lunĉo, al kiu, ĉiu partoprenanto devas alalporti ian manĝaĵon. Panon kaj trinkaĵojn aĉetos la Grupo.

Dimanĉon 18-an de Decembro:

12 h.: "Txistu"-a koncerto.

13 h.: Post kanto de la Espero, lunĉo.

14 h.: Komuna manĝo ĉe nemultekosta restoracio. Proksimuma prezo: 1.000 ptoj/persone.

Kaj ne forgesu ke tiu-ĉi estos la lasta tago por aĉeti loterion.

HE !! Ĉu vi jam legis SUPRE ?, la SABATON 17-an de DECEMBRO je la 7-a h., EN NIA GRUPO, PROJEKCIO de DU VIDBENDOJ EN ESPERANTO !!!

VERE UNIKA ŜANCO ! Ni atendas vin, ESTU AKURATA !



E-REVUOJ

esperanto

la revuo de uea

La revuo ESPERANTO estas la monata oficiala organo de UEA. Ĉiu 24-paĝa numero entenas raportoj pri okazintaĵoj, artikolojn pri la movado kaj rilataj temoj, resumojn kaj recenzojn pri laste aperintaj verkoj en (aŭ pri) Esperanto, kaj multajn utilajn informojn por movadaj aktivuloj.

Jarabono: 2.070 pesetoj



ekaperinta en 1905

Abonu per membriĝo en UEA. Tiel vi ankaŭ trafos:

- *Jarlibro/Gvidlibro*, la ĉiujaran ŝlosilon al Esperantujo;
- rabatitan aliĝkotizon al la Universalaj Kongresoj de Esperanto;
- se malpli ol 26-jara, membrecon en Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ties organon *TEJO tutmonde*, kaj rabatitan aliĝkotizon al la Internaciaj Junularaj Kongresoj.

kontakto

En unu 16-paĝa numero de KONTAKTO, vi povas trovi originalajn artikolojn el ĉiuj kontinentoj de la mondo; reto de plejparte junaj verkantoj regule kontribuas el ĉiuj mondpartoj.

La duono de la artikoloj estas en simpla lingvaĵo. Ĉiu artikolo portas simbolon, kiu indikas ĝian facilecon laŭ 4-ŝtupa sistemo. Ĉe la facilaj artikoloj staras klarigoj de la vortoj ekster la norma vortlisto.

REKOMENDINDA GAZETO POR LA JUNULARO KAJ POR NOVAJ ESPERANTISTOJ.

Jarabono:

1.040 pesetoj

kaj ricevante la revuon en la Grupo per kolektiva abono nur:

450 pesetoj



(6 numeroj jare)

HEROLDO
DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 68 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 16 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Junulara, instruista, literatura rubrikoj, libro-recenzoj, listo de fakaj artikoloj en Esperanto
- Duobla Kongresa numero, kalendaro de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj
- Libera Tribuno de la legantoj, anoncetoj, ŝak-problemoj, foto-filmo
- Sciencaj suplementoj, ktp.

Jarabono: 1.800 pesetoj

Redakcio:

Via Natele Sandre 15, I-10078 Venaria Reale (TO), Italujo.

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

E-REVUOJ

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

UNIKA

MONATO estas laŭ pluraj aspektoj.

● Ĝenerale oni povas diri, ke ĝi estas la unua sukcesa provo, eldoni revuon kun ĝeneralaj temoj – do ne pri-esperantaj – sur profesia nivelo, en Esperanto. Oni ne povas kompari ĝin kun iu alia revuo, ĉu Esperant-, ĉu naci-lingva.

● Kaj unika – kompare al aliaj Esperanto-revuoj – ĝi estas, ĉar MONATO traktas la tutan spektron de la moderna vivo, de politiko ĝis kuir-receptoj, de turismo ĝis por-infanaj temoj.

● Unika, fine, MONATO estas ankaŭ pro tio, ke per ĝi vi perfektiĝas en la ĉiutaga moderna Esperanto.

ALTERNATIVA

MONATO estas ĉefe pro tio, ke ĝi ne estas farata laŭ la kutimaj principoj, kiuj regas naci-lingvan ĵurnalismon: pri „sensacioj" el tuta (?) mondo raportas eksterlandaj ĵurnalistoj, el la plej diversaj landoj, sen koni lingvon, kulturon, historion, sociajn kaj politikajn strukturojn de la koncernaj landoj.

● Por MONATO, male, raportas nur *indiĝenaj* aŭtoroj, kiuj vere konas siajn landojn, ne pri ŝajnaj sensacioj, sed pri tiuj temoj kiuj vere gravas en tiuj landoj.

EKSKLUZIVA


● Ekskluziva MONATO estas, ĉar en ĝi oni rigardas aferojn ne el *nacia*, sed el *internacia* vidpunkto, aŭ – se temas pri konfliktoj inter diversaj landoj – rigardas la aferon el ambaŭ vidpunktoj.

● MONATO do, kontraste al ĉiuj aliaj gazetoj, ankaŭ estas ekskluzive *internacia*, la ĝusta revuo por homoj, kiujn interesas kunvivado de l' popoloj – esperantistoj veraj!

(12 numeroj jare)

Jarabono:

2.950 pesetoj



EL POPOLA ĈINIO

中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO - LIGO

El Popola Ĉinio estas ampleksa monata Esperanta revuo. Duono de la paĝoj estas dediĉita al bildoj kaj 20 el la 72 paĝoj estas koloraj. Nun la gazeto estas distribuata en pli ol 80 landoj kaj regionoj de la mondo.

Nun aperas en la gazeto la rubrikoj "Nunaj Ĉinoj", "Malfermita Urbo", "Vojaĝo tra Ĉinio", "Enciklopedieto de Ĉinio", "Por Via Sano", "Por Komencantoj", "Inter Ni", "Kurantaj Aferoj" k.a. Samtempe, oni aperigas en sinsekvaj numeroj artikolo-seriojn por konigi la historion, antikvajn vidindaĵojn, naturajn belaĵojn, sukcesojn en konstruado kaj la popolan vivon de la koncernaj lokoj.

Pere de Esperanto EPĈ spegulas Ĉinion en diversaj flankoj, helpas la alilandajn esperantistojn koni Ĉinion, akcelas la amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, disvastigas Esperanton kaj klopodas por la monda paco, la feliĉo kaj progreso de la homaro. La artikoloj estas mallongaj, facile kompreneblaj kaj karakteriziĝas per scio, intereso kaj internacieco.

(12 numeroj jare)



Jarabono: 1.200 pesetoj

ekaperinta en 1950

ABONOJ KAJ KOTIZOJ

SUBSKRIBO AL E-REVUOJ: Kiel kutime, ĉe la fino de la jaro, por tiuj kiuj deziras enspezi sendokostojn, ni kolektos monon de ĉiuj kiuj deziras subskribi, por la jaro 1989-a, kian ajn Esp. periodaĵon, por poste kunsendi ĝin al diversaj perantoj aŭ eldonantoj. Pri la plej kutimaj, ni povas jam anonci la ĉi-suban prez-tabelon:

HEROLDO DE ESPERANTO	1.800 ptoj.
EL POPOLA ĈINIO: 1 jaro	1.200 ptoj.
2 jaroj	2.000 ptoj.
3 jaroj	2.900 ptoj.
MONATO	2.950 ptoj.
ESPERANTO	2.070 ptoj.
KONTAKTO	1.040 ptoj.
(Kolektiva abono (10 min.) ...	450 ptoj.

Lasta tago por pagi la subskribojn: 18-an de Decembro. Enkontigu vian monon en la "Caja de Ahorros Vizcaína", konto n-ro: 20-132-272-6, favore al Jesús Miguel García Iturrioz.

****

ALIĜO AL ESPERANTAJ E-ORGANIZAĴOJ.-

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO:

Emerito, Junulo kaj senlaborulo	1.200 ptoj.
Membro abonanto	1.700 ptoj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO:

MG: Membro kun Gvidlibro (la unua parto de la Jarlibro) . . .	550 ptoj.
MJ: Membro kun Jarlibro*	1.380
MA: Membro-Abonanto (Jarlibro + Esperanto)*.	3.450 ptoj.

**Memoru, ke se vi estas malpli ol 26-jara, vi aŭtomate membros en TEJO kaj ricevos senpage la revuojn* Kontakto *kaj* TEJO-tutmonde.

Lasta tago por pagi la aliĝkotizojn: 18-an de Decembro. enkontigu vian monon en la "Caja de Ahorros Vizcaína", konto n-ro 20-132-272-6, favore al Jesús Miguel García Iturrioz.

G R U P A J N O V A Ĵ O J

DONATIVO DE LIBROS.- Hace escasas fechas, la viuda del inolvidable Rafael Palacios, se puso en contacto con la Junta directiva de nuestro Grupo para manifestar su deseo de que el material Esperantista propiedad de su marido, principalmente libros, pasara a engrosar el patrimonio de nuestra Sociedad.

Hoy, cuando tal material se encuentra ya en nuestro poder, no nos queda sino dar nuestras más efusivas y sinceras gracias a los familiares de una de las personas que más trabajò en Bilbao por y para el Esperanto, participando activamente en nuestra vida social y aportando su ayuda cuantas veces fue requerida.

Esperamos que tal acto sirva de ejemplo a aquellos que poseen en sus casas pequeños tesoros de libros en o sobre el esperanto, propiedad de familiares ya desaparecidos y, en su día, activos Esperantistas.

★★★★★★★

COBRO DE CUOTAS 1.988.- Se ruega a aquellos socios que aún no han realizado el pago de su cuota de adhesión al Grupo, correspondiente al presente año de 1.988, lo hagan a la mayor brevedad posible, bien personándose en nuestra Sede Social, donde serán recibidos con la cordialidad de siempre, bien haciendo el ingreso de su cuota en la CAJA DE AHORROS VIZCAINA, en la cuenta 20-218-155-0, a nombre del Grupo esperantista de Bilbao.

Se recuerda que hay dos tipos de cuotas:

Cuota normal ..... 1.200 pts.
Cuota reducida (Jubilados, estudiantes, Parados, etc.) ..... 600 pts.

Como viene siendo habitual, el próximo año 1989, tales cuotas no sufrirán aumento alguno.

★★★★★★★

KRISTNASKA LOTERIO

LOTERIA DE NAVIDAD.- este año las ventas están siendo rápidas, por lo que se recomienda a los interesados pasar cuanto antes por el Grupo, a recoger sus participaciones del nº 06958.

Se recuerda que NO SE RESERVA LOTERIA y que el último día de venta será el DOMINGO 18 DE DICIEMBRE, coincidiendo con el final de las "Fiestas de Zamenhof", que celebraremos en nuestra sede y cuyo programa encontraréis más adelante. Os invitamos a todos muy sinceramente.



* ESPERANTO *

La lingvo de la amikeco

LA GRUPO ESPERANTISTA DE BILBAO

DEZIRAS AL VI ĈIUJ ĈION BONAN POR

LA NOVA JARO 1989-a.




	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	D	O	M	O	■	P	L	U	S
2	E	K	I	R	I	S	■	N	P
3	Ĵ	U	S	■	A	■	Ĝ	U	U
4	O	L	E	U	M	I	■	A	R
5	R	O	■	N	■	M	A	■	■
6	I	■	F	U	R	I	O	Z	A
7	■	L	U	I	■	T	R	A	F
8	S	A	N	G	■	I	T	■	E
9	A	K	T	I	V	■	O	G	R

(SOLVO de la KRUCVORTENIGMO
NIA PONTO - Oktobro/88)

DONACO.- Inter tiuj kiuj korekte solvis nian pasintan krucvortaron, ni lotis la promesitan libron "Fabeloj de la verda pigo". Ĝin gajnis nia kara amiko el Asturio Sro. SANTIAGO MULAS. Ni gratulas lin!.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Konstruu kun ni



ponton
inter
la
popoloj

fortan
movadon
por
Esperanto

mondon
sen
lingva
problemo

UEA

Universala Esperanto-Asocio. Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.